**N I A  V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO- AUGUSTO 2003**

## GRANDA VORTARO

La Granda Vortaro Hispana-Esperanto de Fernando de Diego, tiom longe atendita de la hispanlingva esperantistaro, estos prezentita la 18an de julio, dum la Kongreso de Valencio. La komuna peto de ekzempleroj farita de MEL atingos Madridon je la fino de septembro.

## VALENCIA URBESTRARO AKCEPTOS LA KONGRESANOJN

La Valencia Urbestraro akceptos la ĉeestantojn al la 62ª Hispana Kongreso de Esperanto la 16an Julio je la 13.00 horo en la Kristala Salonego de la Urbodomo. Dum la Kongreso okazos pluraj prelegoj, prezento de libroj (i.a. la vortarego de De Diego), literatura seminario, konkursoj, arta vespero, vizito al la urbo (oficiale organizita de la urbestraro), vizitoj al la fabriko Lladró kaj al la Urbo de la Artoj kaj la Sciencoj, krom ekskurso al la rokego Ifach kaj al Benidorm. La kompleta programo estas legebla en la retpaĝaro de HEF: www.esperanto-es.net

## NOVA E-ASOCIO

En aprilo naskiĝis en Jaén la kultura asocio "Jaena Esperanto-Asocio" kies celo estas renkontigi la esperantistaron de ĉi tiu andaluzia urbo kaj disvastigi la internacian lingvon en Jaeno. Adresoj: Camino Fuente de la Peña, 16. 23002 Jaén. http://www.esperanto-jaen.tk
esperanto-jaen@wanadoo.es Gvidantoj: Pablo Foche kaj Francisco Díaz.

## ĈU STUDI AŬ FERII ?

Eblas studi Esperanto-literaturon perkoresponde , sub la gvido de d-ro Giorgio Silfer, literaturisto, gvidanto de la katedro pri literaturo che la Esperantologia Fakultato de KCE. Detalan informon donas: KCE, CP 311, CH-2301, La Chaux-de-Fonds. Tel/fakso: (41)32-9267407. Rete: esperanto@bluewin.ch
En Francio vi povas viziti la esperanto-centrojn por studi kaj ferii aŭ restadi tie speciale por renkonti samideanojn.
Kulturdomo de Esperanto. Kastelo Gresillon, FR-49150 Baugé, Francio. Tel +33 241 89 10 34
Rete: kastelo.gresillon@free.fr
Esperanto Centro Kvinpetalo. Rue du Lavoir, FR-866410 Bouresse, Tel + 33 5 49 42 80 74
Rete: kvinpetalo@post.club-internet.fr
Kultura Centro Esperantista. C.P. 311. Postiers 27, CH.2301 La Chaux-de-Fonds. Svislando. Tel + 41 3 29 26 74 07 Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

## JURA TRIBUNO INTERNACIA

La venonta numero de la esperanta revuo "Jura Tribuno Internacia", kies direktoro estas nia kordova samideano José María Rodríguez Hernández, aperos koincide kun la Universala Kongreso en Gotenburgo, Svedio. Interalie, aperos artikoloj pri "Protektado de la Ĵurnalistoj dum la militaj konfliktoj fare de la Internacia Homarana Juro", pri la Internacia Kriminala Tribunalo kaj pri "La konstanta agreso kiel leĝa sindefendo en la Internacia Juro".

## KATALUNA ESPERANTA ENSEMBLO TURNEOS EN BRAZILO

La fama kataluna esperanta ensemblo pri popola muziko "Kaj Tiel Plu" turneos en Brazilo dum ĉi monato Julio. Ĝia kompakta disko "Sojle de la klara vent'" estis eldonita fare de la konata esperanta muzikeldonejo Vinilkosmo. Kelkaj el ties kanzonoj estas elŝuteblaj lau formato MP3 el la muzika E-portalo Suda Kruco:
http://www.gxangalo.com/sudakruco/modules/mydownloads
kaj el la portugallingva www.musicexpress.com.br (elektu: esperanto)



## RETE

- La revuo "Venezuela stelo" , oficiala organo de Venezuela Esperanto-Asocio, post 30 jaroj de papera eldono nun jam legeblas en la paĝo www.esperanto-ve.org.

- Jen interesa ligilo al Urba Biblioteko de Valencia (Hispanio), kie antaŭ kelkaj jaroj aperis granda stoko da e-materialo, malaperinta dum la Civila Hispana Milito (1936-1939).
Http://www.ayto-valencia.es/ayuntamiento2/ndBMunicipal.nsf/0af5a1b096146bd8c1256ae600401c0e?SearchView
Ĉe "search" simple tajpu "esperanto", kaj atendu iomete. La tuta stoko konsistas el ĉirkaŭ 800 e-libroj, multaj el ili nuntempe unikaĵoj.
- Vortara esperanta programo estas elŝutebla el la jena retadreso: http://welcome.to/vortaro
Post la instalo, oni povas elŝuti Esperanto-vortaron en la jenaj lingvoj: Afrikansa, angla, brazil-portugala, ĉeĥa, dana, euska, finna, franca, frisa, germana, hispana, hungara, irlanda, islanda, itala, kataluna, latina, nederlanda, norvega, slovaka, surinama kaj sveda.
- La revuo "Kataluna Esperantisto" estas elŝutebla lau pdf-formato (Adobe Acrobat) en la retpaĝo www.esperanto-ct.org
Ankaŭ en tiu sama retpaĝaro estas elŝutebla ampleksa vortaro esperanta - kataluna (162 paĝoj en pdf-formato), legebla per Adobe Acrobat, kies aŭtoroj estas Hèctor Alòs kaj Jordi Carbonell: www.esperanto-ct.org/vortaro/vortaro.pdf
- La valadolida Esperanto-grupo jam havas retpaĝon, lau informis Rodrigo Portela Sánchez: vizitu ĝin en la retadreso http://valadolido.eejo.com
- La hispana asocio Maldekstro kaj Esperanto (SAT en Hispanio) havas propran retpaĝaron, atingebla per la adreso http://satenhispanio.eresmas.com

**VENONTAJ KONGRESOJ**

KONGRESO DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO en Valencia 15-20-a de julio
http://www.esperanto-es.net/kongreso/2003/
Kunveno de Asocio Maldekstro kaj Esperanto - SAT en Hispanio. Valencia 18 Julio.
76-a SAT Kongreso. 12-19 julio. La Chaux-de-Fonds (Svisio)
88-a UK. 26 julio - 2 aŭgusto. Göteborg (Svedio).
2-a Someraj Dialogoj. 6-7 septembro. Monistrol de Montserrat (Barcelono)
11-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. 4-11 oktobro. Santa Susanna (Barcelona)

**NEKROLOGO**

La 23an Majo forpasis en Reus nia neforgesebla samideano, jam 100 jaraĝa, Salvador Gumà i Clavell. Esperantisto dum 84 jaroj, gajninto de beletra konkurso de UEA, li verkis multnombrajn rakontojn en Esperanto, elstarante lia lasta libro "Kiam floras la timianoj". Pace ripozu.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

La HEF-oficejo estos fermita dum julio, en aŭgusto Manolo Parra ĉeestos lunde kaj ĵaŭde inter la 17,00 kaj la 21,00 horo.

MEL FERIOS. Dum julio, aŭgusto kaj septembro ne okazos konversaciaj rondoj

NI REVIDOS LA UNUAN LUNDON DE OKTOBRO

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**
**28005 Madrid**
Asociación de Utilidad Pública Municipal